49a Jaro — N-ro 3a — Marto 1957a

# BELGA ESPERANTISTO

Fondita en 1908a

Redaktoro-Administranto:
la Prezidanto de R.B.L.E.:
**Maur. JAUMOTTE**
Avenuo De Bruyn, 44
Wilrijk-Antverpeno

Oficiala monata Organo de
**REĜA BELGA LIGO ESPERANTISTA**
Asocio sen profita celo,
aliĝinta al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Abonprezo:
Fr. 100,-

## Nia 5-a Beneluksa




*Frutempa anonco*

El la korespondado de la L.K.K. kun la aliĝontoj montrigis ke ne ĉiu komprenis ke frutempa anonco necesas por ĉiu ero de la programo. Ekzemple la aŭtobuson por nia ekskursoni devas mendi antaŭ la 1-a de majo. Dum la kongreso do ne plu eblas aliĝi al la ekskurso aŭtobusa.

*Aldono al la provizora programo*

Oni petis al ni aranĝi ekskursojn dum la jarkunveno antaŭtagmeze kaj posttagmeze ne nur por la edzinoj kaj fianĉinoj de la delegitoj sed ankaŭ por aliaj personoj. La L.K.K. faros tian aranĝon.

Ankoraŭ ne eblas publikigi la definitivan programon de la aranĝoj dum la nunjara Beneluksa kongreso. La L.K.K. klopodos ĝin presigi en la aprila numero de ĉi tiu gazeto.

*Glumarkoj*

La vendado de la glumarkoj kun la emblemo de la 5-a Beneluksa Esperanto-Kongreso marŝas laŭdezire. L.K.K. presigis novan kvanton. Dek ekzempleroj estas haveblaj por 25 cendoj. Oni povas mendi por poŝtkonto 65.76.64 de „Esperanto", Eindhoven aŭ per bonaj ne-uzitaj nederlandaj poŝtmarkoj en koverto ĉe la sekretariino de la L.K.K., Fockema Andreastraat 1, Eindhoven.

### Grava Informo

**Tiu ĉi numero jam ne plu estas sendata al la nerepagintaj membroj.**

**La kasistoj do zorgu por tuja transsendo de intertempe okazintaj repagoj de kotizoj.**

**Ni tuj sendos la trian numeron al la repagontoj.**

## La Jubileaj Festoj en Bruselo

Ni, en nia antaŭa numero, jam anoncis ke la Esperantista Brusela Grupo ekzistas ankaŭ de 50 jaroj kaj ke ĝia estraro decidis festi solene tiun ĉi jubileon *dimanĉon la 7an de aprilo*.

Intertempe, la organiza komitato kunmetis definitivan programon por tiuj ĉi festoj:

Je la 9a horo: Malfermo de la akceptejo en la nova sidejo de la Grupo: „Brasserie de la Justice", Place du Grand Sablon 38, Grote Zavel (la tute renovigita salono en kiu, dum jaroj, jam okazis kunsidoj de la grupo).

Je la 10a: Solena Jubilea Kunsido, en la sidejo.

Je la 12a: en la Urbdomo, oficiala Akcepto, fare de la Urbestraro (kun vizito al la konstruaĵo).

Je la 13a: Jubilea Festeno, en salono de la restoracio „L'Ecu de France", rue de la Violette, 42, Violetstraat.

Je la 17a: Kabareta Vespero kaj Balo, en la sidejo kun kunlaboro de la teatraj sekcioj de Bruselo kaj Antverpeno.

La Organiza Komitato fiksis kotizon, kiu enhavas la partoprenon al la jubileaj festoj kaj al la jubilea festeno kaj kiu altiĝas je Fr. 150.

Tiu ĉi prezo enhavas, rilate al la festeno, la trinkaĵojn, glason da blanka kaj glason da ruĝa vino kaj la servomonon . . . Kaj la menuo certe kontentigos ĉiujn, ĉar ĝi enhavos antaŭmanĝaĵon, supon, enkondukan pladon, kokidon kaj deserton.

Je la momento de la apero de nia revuo, jam ne plu restos tro da tempo por la organizantoj. Vi do helpu ilin, ensendante *TUJ* vian aliĝkotizon al la poŝtĉeknumero 12.30.48 de la Esperantista Brusela Grupo.

Estas jam certe, ke gravaj delegacioj el diversaj urboj vojaĝos Bruselen okaze de tiuj ĉi jubileaj festoj, dum kiuj estos honorigataj multaj bone konataj malnovaj amikoj.

Neniu do hezitu kaj tuj faru sian devon!

## La Ĝenerala Mondekspozicio en Bruselo 1958

Kiam je 3 Aprilo 1958 la Mondekspozicio estos malfermata, komenciĝos ne nur vastega kaj interesega ekspozicio, sed ankaŭ periodo de riĉa kaj varia kultur-, art-, kaj literaturagado. Dum 7 monatoj tiu ekspozicio estos honorigo al la homo en ĝia kompleteco, speciale al ĝia krea genio. Tial ĝi okazos sub signo ne de la tekniko aŭ de la materio sed sub signo de la humanismo. Oni prilumos tie ankaŭ la spiritajn akiraĵojn de la homo kaj ĝiajn intelektajn laborojn. Estas pro tio ke okazos multaj kongresoj. Celo estas: pliproksimigi kaj daŭre interrilatigi intelektajn esploristojn de la tuta mondo. Dum la ekspozicio ili povos komuniki unu al la aliaj siajn provojn, rezultatojn, rimarkojn, sugestojn ktp. Se ni povas tiel diri, la ekspozicio havos temon, nome: la homo en la mondo de hodiaŭ kaj de morgaŭ. Kaj pro tio la estraro de la ekspozicio demandas ke absolute ĉiuj kongresoj okupiĝu dum almenaŭ unu kunveno pri specifike homaj problemoj kaj ke ili verku raporton pri tio. Ĉiuj tiuj studoj estos en ĝenerala raporto kunigataj kaj formos ampleksan dokumenton. Tiel la estraro eĉ esperas helpi al renovigo kaj plibonigo de la mondo kaj de la homaro. Inter la plej elstaraj manifestacioj estos du artekspozicioj. Ĉiuj muzeoj de la mondo estas petataj partopreni. Unua ekspozicio montros la arton de la prahistorio ĝis nun. Dua la nuna arto ĉie en la mondo. Estus tro detale se priskribi tie-ĉi la eksterordinarajn standojn kiujn prezentos ĉiuj partoprenantaj nacioj. Ekz. en la kadro de Belgujo estos starigata la „palaco de la eleganteco". Tie okazos

**R a k o n t o**

# Nokta Aventuro

Kiam la komerc-vojaĝisto revenis hejmen je la naŭa kaj duono vespere, lia edzino kisis lin laŭ kutime kaj diris: „Vi estas malfrue".

Li neglektis tiun rimarkon kaj demandis: „Kie estas Manjo?"

„Tion vi ja scias", respondis la edzino, „Estas hodiaŭ la festvespero, kiun ŝi partoprenas „Estas ŝia unua dancvespero. Bele vestite ŝi iris tien per la tramo, maldiketa deksesjara knabino

*El la Nederlanda lingvo.*
*libreto: „Spijbelen" de S. Garmiggelt.*

-kun atendoplena rideto ĉirkaŭ la buŝo.

Aĥ, diris la patro „kaj je kioma horo ŝi revenos?" „Je la unua noktomeze" respondis la patrino, „tion ni ja interkonsentis?"

Malfermante la gazeton la edzo komentis: „Vi bone scias ke mi opiniis tion tro malfrue" „Certe, sed la aliaj knabinoj ankaŭ havis permeson ĝis tiu horo" paceme aldonis la edzino, ĉar oni jam sufiĉe priparolis tiun temon. Malafable li kapjesis kaj stariĝis. „Restu do sidanta", ŝi diris „kiel maltrankvila vi estas."

„Kiuj estas ĉe la festo?" li demandis. „Nu, Anjo, Henjo, Finjo..."

„Ne, la knabojn mi celas, kiuj knaboj partoprenas?"

„Ho, Joĉjo, Karlo kaj Petro de la buĉisto.."

Ankaŭ TIU, li ekkriis, tiu idiota barbaro?! Kiu ĉiutage promenaĉas kun alia knabino?" „Jes, ankaŭ Petro, la barbaro", ŝi diris rezerveme kaj ŝi iris al la kuirejo. Tiel pasis horo. Oni ne multe konversaciis.

Je la dekunua li subite diris: „Ĉu ni iru al tiu salono? Tiam ni povos kunpreni ŝin hejmen...La maniero laŭ kiu tiu buĉist-ido alrigardas Manjon ĉe renkonto ne plaĉas al mi... Kompreneble ŝi dancos kun LI la tutan vesperon!"

„Estas ankaŭ aliaj knaboj — trankvilaj-fidindaj" ŝi diris.

Tamen post kvaronhoro ili veturis trame al la festsalono. Ili nestiĝis en kafejo je la alia flanko de la strato kaj atendis. Post kelka tempo la gedancintoj forlasis la ejon. Malantaŭ arbo la geedza paro vidis ilin preterpasi, sed Manjo ne estis inter ili... „La salono estas malplena, sinjorino servisto diris, kiam la patrino envenis la salonon por rigardi.

„Nu, bela afero", amare diris la patro kiam ili iris hejmen.

„Tre bela afero. Ŝi certe jam frue foriris kun sia buĉisto. Estis sendube tro multe da homoj por ŝia Sinjorina Moŝto en la salono..."

„Aĥ, tion vi ja ne scias," sonis malforte patrina defendo.

„Ili nun interkisas ie en portiko... aŭ ie en ĉambro. Bele! Oni lasas la filinon iri al festvespero...tie ŝi estas en bona societo. Sed unu afero okazos morgaŭ se mi hazarde renkontos tiun Petron, mi rompos al li..." „Vi nenion rompos" decidis la edzino.

En la malluma domo ili sidis sur la litrando. Estis preskaŭ la unua kaj duono.

„Ĉu mi faros teon?" ŝi demandis. „Ne, prefere kafon " li respondis, „tio ĉi estos sendorma nokto."

Lia edzino iris al la kuirejo kaj lasis lin en tristaj pripensoj.

Daŭris iom longe antaŭ ol ŝi revenis. „Ĉu vi havas kafon?" li demandis.

„Ne", ŝi mallaŭte respondis, „mi estis ĉe Manjo".

„Ĉe Manjo??"

„Ŝi kuŝas en la lito", ŝi daŭrigis, „ŝi jam venis hejmen je la dekunua kaj duono. Iom post kiam ni estis for."

„Kaj ŝi havis permeson ĝis la unua!" li kriis.

„La vespero ne plaĉis al ŝi," diris la patrino; „vidu, oni ne petis ŝin por danco. Ne unu fojon...ŝi nur sidis tie...

„Oni ne petis ŝin!" furiozis la edzo, „PRI KIO PENSAS TIUJ BUBAĈOJ!"

„Se morgaŭ mi renkontos tiun Petron, mi rompos......"

Fino. v. Tw.

---

la solenaĵoj kaj en angulo de ĝi estos la pavilono de la diamantoj kaj tiu de la luksaĵoj. Sennombraj estos la belegaĵoj tie, kaj la tuto prezentos neimageblan belon.

Por atingi supre-menciitan celon, la estraro disponigos multajn salonojn kiel ekz. palaco IX (2.500 lokoj). Estos aparatoj kiuj ebligos samtempan tradukon en multaj lingvoj. Esperanto ne ankoraŭ estas sufiĉe uzata kaj tial tiuj grandegaj kostoj kaj komplikaĵoj kaj malperfektaĵoj estas neeviteblaj. La estraro zorgas ankaŭ pri loĝado. Jam enskribiĝis multaj civitanoj kiuj volas forlui unu ĉambron. Estas konstruata sub la nomo „Expo-Motel 1958" ia urbeto kun 2.000 ĉambroj po du litoj; poŝtoficejo, telefonoj, Ruĝa Kruco ktp. Estos ankaŭ tereno por tendumi. La estraro volas ankaŭ ke la tuta lando preparu sin por akcepti la gastojn en '58. Tial ĝi instigas la popolon por lerni fremdajn lingvojn per kursoj. Ĝi ankaŭ faras kampanjon por ĝentileco flanke de ĉiuj oficistoj. Kaj, fine, la tuta lando devos havi belan aspekton. Ĉiuj publikaj konstruaĵoj kaj vojoj estos ornamitaj per floroj.

Rilate la lernadon de fremdaj lingvoj, la estraro ne diras kiom da lingvoj nek kiujn la Flandroj kaj la Valonoj devos lerni. Ĝi evidente volas ke la tuta nacio havu rektan rilaton kun la fremdaj vizitantoj. Sed kiom da diversnacianoj venos? Konsiderinda nombro, certe. Kiom da studohoroj necesos por ke oni povu iom babili pri nur ĝentilaĵoj? Ni ne parolas pri la vera kontakto kiu estas pli intima. Tiujn realaĵojn la estraro ne sufiĉe pripensas aŭ ne trovas solvon por ili. Esperinde, la esperantistaro grandnombre skribos al la direktoraro en nia lingvo por peti informojn ktp. Ja, la direktoraro havas intereson pri Esperanto; nur ne scias ĉu jam multe utilas. Iamaniere la Esperanto-movado devus pruvi la kulturan valoron de Esperanto per ia manifestacio, ĉu somera universitato? ĉu per kongreso ? Adreso de la Mondekspozicio : Putterij 28, BRUSSEL.

*Fernand Roose.*

---

## S-ro Gustave Vermandere mortis



*(desegnaĵo de la pentristo Leon Brunin, okaze de la XXa Universala Kongreso, en 1928a)*

Subite mortis en sia hejmo S-ro Gustave Vermandere, kiu dum la lasta jaro estis preskaŭ daŭre malsana, sed kiu tamen, ĝis la lasta tago, kondukante sian aŭtomobilon, ankoraŭ ekpromenadis.

Je sia granda bedaŭro, li estis malhelpata ĉeesti la jubileajn festojn de la Grupo „La Verda Stelo" al kiuj li tamen aliĝis. Li, kun granda dankemo, la tagon poste, ricevis, el la manoj de la sekretario, la plaketon, kiu estis donacata al li, okaze de lia veteraneco.

Li efektive esperantistiĝis en Gento, sia naskiĝurbo, en 1911, kie li rapide altiris la atenton en la loka grupo; kie li partoprenis teatroludojn; akiris sian diplomon pri profesora kapableco kaj iĝis unu el la plej entuziasmaj junaj elementoj.

Post la unua mondmilito, li transloĝis al Antverpeno, kie li partoprenis ĉiujn iniciatojn de la Grupo: En 1926a li estis unu el la fondintoj de „Belga Esperanto-Instituto", kies prezidanto li, dum tri jaroj, iĝis post la morto de S-ro Fr. Schoofs; en 1928a, li estis membro de la L.K.K. por la XXa Universala Kongreso kaj prizorgis la tre malfacilan loĝigon de la mil kvincent partoprenantoj.

Neniam li ambiciis nek volis akcepti daŭran, gvidan rolon en la Grupo, kies fidela konsilanto li tamen seninterrompe estis. Sed rolon, kiun li plej zorgplene plenumis estas certe tiu de delegito de U.E.A. por Antverpeno.

Nenie en Belgujo, nek en la mondo, eksterlandaj vizitantoj estis iam pli bone, pli agrable kaj pli dediĉoplene akceptataj ol en Antverpeno, fare de la amiko Staf, kiu tre ofte dediĉis tutajn tagojn al la vizitigo de la interesaĵojn de la Skeldo-urbo al alilandaj vizitintoj.

Lia foriro penige impresis ĉiujn, kiuj lin konis kaj, malgraŭ la fakto ke la enterigo, (post cindrigo en Ukkel, en ĉeesto de delegito de R.B.L.E. kaj de „La Verda Stelo") okazis en intima rondo en la enterigejo de Mortsel, multaj amikoj, apartenantaj al la Ruĝa Kruco, en kiu li, — precipe dum la milito, — plej aktive laboris, kaj al „La Verda Stelo" tamen volis alporti al li lastan saluton.

S-ro M. Jaumotte ĉirkaŭata de S-ro Sielens, ĝenerala sekretario de R.B.L.E., de S-roj De Ketelaere, vic-prezidanto, Verstraeten, sekretario kaj de la tuta komitato de la loka grupo, adiaŭis lin per trafaj kaj plej amikaj vortoj.

Ankaŭ en aliaj urboj de Belgujo multaj fidele memoros la karan foririnton.



## JUGOSLAVIO, FAME KONATA VOJAĜLANDO, INVITAS VIN AL IFEF-KONGRESO EN RIJEKA

*Subvencio de pli ol 1 miliono da dinaroj kaj konsiderinda fervojrabato ebligos multnombran ĉeeston al la Kongreso*

Inter 11—17 de majo ĉi jare okazos en Rijeka, la plej granda marhaveno de Jugoslavio kaj grava industria, ekonomia kaj kultura centro, la 9-a internacia fervojista E-kongreso.

Ne estas pura hazardo, ke dum la 8-a IFEF-kongreso en Stokholmo estis akceptita kiel nova kongreslando Jugoslavio. En tiu lando kun malnovaj tradicioj, ankaŭ esperantistaj inter fervojistoj (ni memorigu nur pri tio, ke inter la jaroj 1924—1931 la sidejo de Internacia Asocio de Esperantistaj Fervojistoj troviĝis en Jugoslavio, kie aperis ankaŭ la organo „La Fervojisto"), post la dua mondmilito ree la E-movado inter la fervojistoj vaste disvastiĝis.

En la jaro 1955 estis fondita en kadro de IFEF kaj Jugoslavia Esperanto-Federacio la landa asocio: Jugoslavia Asocio de Fervojistoj Esperantistoj (JAFE), kiu nun nombras 5 societojn (Beograd, Zagreb, Ljubljana, Sarajevo, Skoplje). En preparo estas fondo de novaj societoj kaj ekzistas fortaj grupoj en pluraj lokoj. JAFE nun nombras pli ol 350 anojn. La fervojista sindikata organo „Transport" aperigis en la jaro 1954 apartan kurson por fervojistoj de Inĝ. L. Sekeres, kaj post tio dediĉas al la Internacia Lingvo apartan atenton.

En aprilo 1956 Fervojista Esperanto-societo Zagreb komencis eldoni organon „Jugoslava Fervojisto" (redaktata de J. Zupaniĉ), kiu poste fariĝis organo de JAFE kaj kiel tia aperas ankoraŭ nun.

Substrekinda estas ankaŭ la granda komprenemo por la afero de la Internacia Lingvo ĉe la autoritato en Jugoslavio kiu ebligas senĝenan kaj rapidan evoluon de la movado. Ni menciu, ke la OKK ricevis por la IFEF-kongreso subvencion de la Urba komitato

(*Sekvo sur p. 22*)

## „MONDO"

Ĉiuj niaj legantoj, abonantoj de la revuo „Mondo", jam ekscias, per specialaj cirkuleroj senditaj de la eldonantoj, pri la malfacilaj cirkonstancoj en kiuj nun iĝis tiu eldonejo, pro plej malŝatindaj agoj de nekonatoj, kiujn la juĝa povo cetere klopodas ekkoni.

Je la momento de la apero de nia revuo, verŝajne ankaŭ estos aperanta aŭ jam aperinta la kvara numero de tiu ĉi revuo, en kiu la eldonintoj ne nur tute detale pritraktas la malgaĵajn okazintaĵojn, sed ankaŭ faras varmegan alvokon al la tuta esperantistaro, por ke ĝi daŭrigu siajn klopodojn vivigi tiun ĉi revuon per propraj rimedoj.

Ke tiuj do, kiuj ne jam abonis, tion faru tuj kaj ke la aliaj daŭrigu sian varbadon kaj klopodu akiri ĉiu unu plian abonanton, tiel ke la eldono povu esti daŭrigata sur nova firma bazo.

---

La aertrafika asocio AIR FRANCE eldonis belan kvarpaĝan informilon presitan sur luksa papero en tri koloroj, kun bildoj, okaze de la 42-a Universala Kongreso de Esperanto, — Marseille 3—10 aŭgusto 1957. Ĝi estas senpage havebla ĉe:

AIR FRANCE, 9 Avenue Général-Leclerc. Marseille (3 ème), Francujo.

### KOMUNIKOJ DE LA LIBRO-SERVOJ

| | | gld. | fr. |
|---|---|---|---|
| *Kontralte (M. Boulton) nova poemaro* | | 7.20 | 90.— |
| *Koko krias jam (Szilagy) novelaro* | | 7.20 | 90.— |
| *El la Maniko (R. Rosetti) „* | | 7.20 | 90.— |
| *Bagatelaro (Rosbach) „* | | 4.— | 55.— |
| *Morto de Trajno (Crofts) detektiva romano* | bind. | 5.30 | 70.— |
| *Miru, Pensu, Ridu (Bennemann) varia enhavo* | „ | 5.40 | 73.— |
| *Vagabondo kaj Sinjorino (Kloepffer)* | „ | 3.— | 45.— |
| *Anstataŭa Edzino (Maxwell)* | „ | 3.— | 45.— |
| *La Alia Pasinteco (Bulthuis)* | „ | 5.— | 78.— |
| *Kredu min Sinjorino (C. Rosetti)* | „ | 5.40 | 73.— |
| *La Normandaj Rakontoj (Maupassant)* | „ | 12.— | 150.— |
| *Gösta Berling (Lagerlöf)* | „ | 11.— | 165.— |
| *La Princo kaj Betty (Wodehouse)* | | 1.20 | 15.— |
| *La Tempo-maŝino (H. G. Wells)* | | 1.20 | 15.— |
| *La Virineto en Bluo (Stuttard)* | | 2.40 | 30.— |
| *Brulanta Sekreto (Zweig)* | | 2.40 | 30.— |
| *Kiso de la Reĝino (I. Naĵivin)* | | 2.40 | 30.— |
| *A.B.C. Libro (N. Rimanto)* | | 0.60 | 7.— |
| *Vivo de Zamenhof (Privat)* | bind. | 3.— | 40.— |
| *Premiaj Romanetoj (verkitaj de konkursintoj)* | | 0.60 | 8.— |
| *Komercaj Leteroj (Pruissen)* | | 1.20 | 15.— |
| *Esperanto in 20 lessen (Bakker)* | | 3.— | 45.— |
| *Sub la verda standardo (Korte)* | | | |
| *Rektmetoda kurso por infanoj, Laborilo I* | | 1.— | 15.— |
| *Laborilo II* | | 1.— | 15.— |
| *Gvidilo* | | 2.50 | 37.— |

**MENDU ĈE:**

*Belga Esperanto Instituto, Oostenstraat 26, Antwerpen, Pĉk. 168958.*
*Libro-servo LEEN, Pythagorasstraat 122, Amsterdam-O.*
*Flandra Esperanto Instituto, Blankenbergse Steenweg 72, Brugge.*

# BELGA KRONIKO

Prezidanto: S-ro Maur. JAUMOTTE, De Bruynlaan, 44, Wilrijk.
Vicprezidanto-Kasisto: S-ro J. Soyeur, 91, Rue du Chêne, Seraing.
Vicprezidantino: S-ino J. Plyson, 185, rue Jourdan, Bruselo.
Generala Sekretario: S-ro H. Sielens, „Internacia Marista Domo", Falconrui, 21, Antverpeno.
(*Poŝtĉeknumero: R.B.L.E.: 13.37.67*)

ANTVERPENO

## Esperanto-Grupo „La Verda Stelo"

(*Poŝtĉeknumero: 726.54*)

Jaŭdon, la 7an, la membroj de la grupo multnombraj ĉeestis la E.K.I.-vesperon, dum kiu estis akceptataj G-roj Bertram Potts, el Nov-Zelando. La prezidanto de E.K.I. kore bonvenigis ambaŭ vojaĝantojn. Poste S-ro Potts faris tre interesan paroladon pri sia lando, pri la primitivaj popoloj, kiuj tie vivis en la pratempoj kaj pri la evoluo de sia patrujo. S-ro Jaumotte tre varme gratulis lin pro la bela vespero, kiun li havigis al la ĉeestantoj.

La 8an okazis vizito al la Pulĉinela Kelo. Oni kunvenis sur la Hendrik Conscience-placo kaj kun lumigilo fabrikita de la familio Debacker kaj harmonikaisto antaŭ si, la sekvantaro trairis la mallarĝajn stratetojn de la malnova urbo, la Grandan Placon, kie okazis ronda danco, kaj baldaŭ troviĝis en la eta ejo, en kiu eldiris prologon: S-roj Fr. Schellekens, W. Van Nereaux kaj J. Vinck. Tiam sekvis la prezentado de „Haar en Quinto" kaj „Urso kaj Valentijn". Agrabla kunesto en kafejo „Quinten Matsys" estis la konkludo de tiu ĉi gaja vespero.

La 15an sekvis la diplomdisdono al la lernintoj de la elementa kurso de S-ro P. Thaey, kun parolado de S-ro R. Van Eynde, kiu detale rakontis siajn impresojn pri vojaĝo, kiun li faris tra Svedujo kaj kiun li cetere ilustris per belaj lumbildoj. Li akiris veran sukceson.

Diplomoj estis transdonataj al F-inoj Elv. De Coene kaj Magda Verlinden (plej granda merito); al F-ino M. Sluyts, S-ino M. L. Vandekerkhove, S-ro Wim Balleux kaj S-ino Jos. Block (granda merito); al F-inoj H. Lewyllie kaj Emil. De Lamper (merito) kaj al S-ro Alb. Van Dessel, F-ino L. De Vos; S-ro Fr. Peeters, F-ino Car. Hofmans (sukceso) kaj, — ekster la kurso, — kun plej granda merito ankaŭ al S-ro Luc De Marré, memlerninto.

S-ino Joséphine Block, en tre bela, vigla kaj bone prezentita paroladeto, dankis la prezidanton de la Grupo kaj la profesoron S-ron Thaey, dum F-ino Elv. De Coene transdonis al tiu ĉi lasta donaceton nome de la lernintoj. S-ro P. Thaey danke respondis kaj incitis al daŭrigo. La Prezidanto, kiu jam estis doninta diversajn konsilojn al ĉiuj, konkludis per lasta gratulo.

La 22an okazis diskutvespero pri la aktuala temo „Ĉu virinoj soldatiĝu?" Al tiu diskuto, enkondukita de F-ino Lisette De Winter, partoprenis vigle S-ino L. Bernaerts, F-ino Bl. Geers, S-ino F. van den Neste, S-ino R. Lecat kaj S-roj H. Boffejon, Luc De Marré kaj la prezidanto mem.

La 1an de marto okazis parolata jurnalo al kiu partoprenis multaj gemembroj, kiuj laŭŝajne ankoraŭ volis daŭrigi la diskuton de la antaŭa semajno; kaj la postan tagon sabaton karnaval-balo, por kiu F-ino De Winter plej bele ornamis kaj S-ro Van Dessel lumigis la salonon. Dum tiu ĉi balo en apaŝatmosfero S-ino Félicie Jaumotte kaj S-ro Fr. Volders gajnis la specialajn premiojn.

La 8an S-ro Luc De Marré faris tre interesan kaj tre bele prezentitan paroladon pri „Astrologio", kiu estas vera scienco kiu, laŭ la oratoro, povas doni al ĉiu tre precizajn indikojn pri sia karaktero. Speciale verkitaj lumbildoj helpis al pli bona komprenigo de la tuto...S-ro De Marré, kiu akiris efektivan sukceson, daŭrigos en sekvonta kunsido la priparolon de tiu ĉi temo.

La 17an diversaj filmoj afable pruntedonitaj de la Usona Ambasadorejo kaj prezentitaj de S-ro R. Van Eynde interesigis la ĉeestantojn dum tuta vespero.

**Programo de la venontaj kunsidoj:**

**Marto:** Pro neantaŭviditajo, la kabaretvespero de la 29a devis esti prokrastata. La prezidanto kaj kelkaj malnovaj membroj komentarios fotografaĵojn, lumbilde prezentitaj, pri okazajoj en la grupo dum la intermilita periodo.

**Aprilo:** la 5an: Parolata Jurnalo; dimanĉon, la 7an: partopreno al la jubileaj festoj de la Brusela Grupo; la 12an: Amuza vespero; la 19an: Sankta Vendred-atmosfero (ĉiu kunportu surprizeton kun rilato al Pasko); la 26an: en „Rocox": Kolbas-vespero (Prezo: Kolbasoj kun buterpano Fr. 25).

**Majo:** Merkredon, la 1an de majo: aŭtoĉar-ekskurso al Bokrijk en Limburgo, por vizito al la plenaera muzeo.

**Familia Vivo**

**Gratuloj**

Al G-roj J. Montmirail-Soetewey, okaze de la naskiĝo de fileto Toni, kiun ni bonvenigas en nian rondon.

Al G-roj H. Vermuyten-Lacroix, unuflanke, pro la fianĉiĝo de ilia filo Hugo kaj, aliflanke, pro ilia duafoja geaviĝo, per naskiĝo de Annemieke filineto de G-roj G. Deckers-Vermuyten.

G. FAES
16, Schoenmarkt, 16
ANTVERPENO
Por via MUZIKO
RADIO kaj GRAMOFONO

BRUĜO

## Bruĝa Grupo Esperantista

(*Poŝtĉeknumero: 4835.33*)

La 5-an de februaro kunvenis en la restaŭracio „La Sirène d'Or", sub la aŭspicoj de la Bruĝa E.K.I., la du grupoj el nia urbo, por aŭskulti paroladon de S-ro Bertram POTTS, el Nov-Zelando, pri „Nov-Zelando, strangaj kutimoj de la antaŭe primitiva raso, kanibalismo, sklaveco, tabuado, tatuado, ktp." Enkonduke S-ro F. Reose, prezidanto de EKI, parolis pri kelkaj lastaj okazintaĵoj en la Esperanto-movado kaj S-ro Gr. Maertens prezentis kun komentario riĉan kolekton de Esperanto-gazetoj. S-ro Ch. Poupeye, prezidanto de B.G.E., ankoraŭ substrekis la ĝojigan fakton, ke la Bruĝa EKI montris dum la lastaj semajnoj diversajn pruvojn de sia aktiveco. Je la 22a, S-ro Potts, tro longe retenita en Gento, alvenis kaj rapide, sed plej klare kaj kompreneble prezentis sian subjekton. La ĉeestantoj, ege interesitaj, dankis lin per vigla aplaŭdado. Fine estis farata fotografaĵo, kiu memorigos pri tiu sukcesinta EKI-vespero.

La 11an de februaro, okazis la laŭstatuta jarkunveno de la Bruĝa EKI. Post la kutimaj raportoj, la komitato, ĝis februaro 1958a, estis kunmetata jene: Prezidanto: S-ro Ch. Poupeye kaj kasistino: F-ino Is. Van Parys, ambaŭ de BGE; Vicprezidanto: S-ro F. Roose kaj sekretario: S-ro Gr. Maertens, ambaŭ de „Paco kaj Justeco".

La 12an, la gemembroj kunsidis denove en la sidejo „Cornet d'Or", kie estis alprenataj kelkaj lastaj aranĝoj por la balo de la 16-a. Tiu balo okazis, kiel kutime, en la granda salonego „Concordia" kaj rikoltis sukceson pli grandan ol ĉiuj antaŭaj. Pri ĝi estis detale raportata dum la ordinara kunveno de la 19a.

La 26an de februaro ekzameniĝis pri simpla kapableco kvin gelernintoj el la lastaj kursoj.



Verreries et Miroiterie DESMECHT & C°
LA LOUVIERE S.P.R.L. Tel. n-roj 223.01 - 225.37
*Du esperantaj markoj:*
TABULO, por lernejtabuloj; KATOKULO, por signalvitroj.

La 3an de marto, post kelkaj komunikajoj, nome pri prokrasto de la nova kurso ĝis la 19a de marto, la ĉeestantoj okupiĝis per gvidata interparolado kaj portretludado.

**Programo de la venontaj kunvenoj:**

1e: ĉiulunde, je la 8a vespere, en la komunuma lernejo de Sint-Michiels: daŭrigo de la elementa kurso gvidata de S-ro Raoul Behaeghel;

2e: ĉiumarde, je la 8a vespere, ek de la 19a de marto, en la **provizora kunvenejo „CONCORDIA"**, Zuidzandstraat 5, Tel. 366.24):

Dum la unua horo de ĉiu kunveno: leciono de nova ELEMENTA KURSO, gvidata de la prezidanto. Ĉiu membro konsideru kiel devon varbi kaj alkonduki almenaŭ unu novan lernanton!

**Programo por la dua horo:**

**Marto:** la 19an: Interkonatiĝo inter novaj gelernantoj kaj malnovaj gemembroj. Legado de B.E.; la 26an: Parolata gazeto.

**Aprilo:** la 2an: Muzika vespero kun komentario de F-ino Y. Poupeye; la 9an: Debato: Ĉu la virinoj devas aŭ povas soldatiĝi; la 16an: Legado de B.E.; la 23an: Parolata gazeto; la 30an: Parolado de S-ino S. Verbeke: Pentrista vojaĝo tra Suda Francujo (kun lumbildoj).

BRUSELO

## Esperantista Brusela Grupo

(*Poŝtĉekkonto: 12.30.48*)

La 28an de Januaro, okazis la ĝenerala jarkunveno; Laŭvice, la sekretario S-ro Jirousek, la Prezidanto, S-ro Jacobs kaj la kasisto S-ro Schumacher legis sian raporton pri la jus finita jaro. Ili estis aprobe aplaŭdataj. S-ro Jacobs dankis ambaŭ siajn kunkomitatanojn, pro ilia granda sindonemo.

Post tio S-ro Jacobs laŭtlegis la historion de la unuaj jaroj de ekzistado de nia grupo malkovritan kaj kompilitan de S-ro Jaumotte, kaj el kiu rezultas, ke ni baldaŭ povos festi nian oran jubileon!!

Plue okazis la voĉdonadoj. Kiel komitatanoj estis elektataj: S-ro Jacobs, prezidanto; S-ro Jirousek, sekretario; S-ro Schumacher, kasisto; S-ino Staes, helpantino; S-ino Stern, helpkasistino; kaj S-ro van der Stempel, helpsekretario.

La 4an de februaro okazis parolata jurnalo. Akiris la plej grandan poentonombron: por tradukajo: S-ro Staes, kun la temo: „Novzelandanoj vizitas Bruselon"; por legajo: S-ro Jacobs, kun la teksto: „La unua ĝenerala Raporto de la Pioniro". Kiel pridiskutota temo, estis elektata tiu de F-ino Rosette Huysmans: „Historio de la Kiso".

La 11an de februaro, komenciĝis nova elementa kurso, gvidata de la sindonema profesorino S-ino W-eyn, kun 9 gelernantoj.

Dum la posta kunsido, F-ino Obozinsky paroladis pri „La Ruĝa Kruco". Kiel komitatanino kaj kunlaborantino de tiu homama instituci0, ŝi fervore skizis ties organizon kaj agadokampon. La parolantino ankaŭ memorigis la ne sukcesintan provon de la Ruĝa Kruco, rekomendi la studadon de Esperanto al ĝiaj membroj. La dankvortoj de la Prezidanto kaj varma aplaŭdo de la ĉeestantoj rekompencis tiun interesan kaj detale dokumentitan prelegon.

La 18an de februaro, S-ro van de Stempel, dum sia perfektiga kurso, priparolis inter aliaj punktoj, la prepozicion „po" kaj la literon „X", (kiam skribi „KS" kaj kiam „KZ" en Esperanto?) La kurso finiĝis per konversacia ekzerco.

**Programo de la venontaj kunvenoj:**

ĉiulunde, je la 20a h., en „BRASSERIE DE LA JUSTICE" (Ia etaĝo), 38, place du Grand Sablon, Bruselo Ia; Tel. 12.64.76.

**Marto:** (pro memore): la 4an: TRANSLOKIĜO: post kompleta aliformiĝo kaj modernigo, ni rehejmiĝas nian antaŭan kunvenejon.

Parolata jurnalo; la 11an: Parolado de S-ino DAEMS: „ĉu oni povis antaŭvidi la okazintaĵojn de Hungarujo?"; la 18an: Perfektiga kurso de S-ro van der Stempel; la 25an: Antaŭlegado de S-ro Jacobs el „La Historio de LA VERDA STELO", verkita de S-ro Sielens.

**Aprilo:** la 1an: Parolata jurnalo; la 7an: dimanĉe: nia Grupo solenas sian ORAN JUBILEON (ĝi fondiĝis la 10an/2/1907): ĉiuj belgaj esperantistoj estas kore invitataj; la 8an: Parolado de S-ino LECAT pri Einstein, la 15an: Perfektiga kurso de S-ro van der Stempel; la 22an: Amuza Vespero; la 29an: Diskutvespero.

LES ENTREPRISES
DERKS
226, Rogierstrato, BRUSELO
Tel. : 15.19.92
Entrepreno de
KONSTRUAĴOJ

# BIBLIOGRAFIO

*„La Aperoj de la Sankta Virgulino en la pasinta jarcento."*
*Eldonita de la Fratoj de la Karitato, Stropstraat 127 GENT Belgujo.*

Sur 24 paĝoj, Frato Arni De Corte, nia ligano, rakontas laŭ simpla, pia maniero la aperojn de la Dipatrino. Al tre multaj placos tiu historia resumo. La broŝuro estas bele eldonita kaj havebla senpage! Tamen oni demandas sed neniel insistas por sendi unu aŭ du respondkuponojn tio estas ebla. Sur linio ses de la unua paĝo mi legas: nia Ĉiela Patrino ne malavaris siajn rendevuojn sur la tero". Ĉu la verkinto ne volis diri la malon? Ni esperas ke la verketo havos tre multe da sukceso. Tiel estraro de la Kongregacio estos ankoraŭfoje pli konvinkita de la utilo de nia lingvo kaj al multaj legantoj ĝi donos moralan forton.

*KENJI OSSAKA: „EL ORIENTA FLORBEDO". Eldonis la Amo-Akademio, Tenmori, Ŝidami, Moriama-ŝi, Aiĉi-ken Japanujo. Havebla tie; kaj ankaŭ ĉe la Japana Esperanto-Instituto, Hongo-Motomaĉi, TOKIO, Japanujo 104 paĝoj; prezo: 0.55 dolaroj aŭ 3 ŝilingoj.*

Post la enhavotabelo, la aŭtoro prezentas sin mem per poemo, per biografia noto, mencio de ĉefaj verkoj, kaj per foto kun alia poemeto. Sekvas sufiĉe detala klarigo pri Japana poezio. Tiam la ekzemploj. Multaj piednotoj donas plian informon. Tiel ni ekscias ke ekz. imperiestro Meiji (1852-1912) verkis 80.000 (jes, okdek mil!) poemojn. Sed oni devas ankaŭ scii ke la envortigo de eĉ nur unu ideo aŭ sento aŭ impreso en kvar linioj povas jam esti poemo, laŭ la Orienta koncepto. Tamen ili ofte estas vere tre belaj kiel tiuj sur paĝo 11. Kontraŭe la dua ekzemplo, sur paĝo 9 estas plej eble banala, vulgara kaj nenionsignifanta. Io eksterordinara: sur unu sama paĝo oni havas maldekstre la Japanan tekston en Eŭropaj literoj, kaj dekstre la Esperantlingvan tekston. De paĝo 27 ĝis 62 oni havas maldekstre la originalon en Orientaj skribsignoj, sed de paĝo 31 komenciĝas la Hinlingvaj poemoj. La aŭtoro aldonas ankaŭ kelkajn originalojn en Esperanto. La libreto finiĝas per kelkaj muziknotoj. Ni bonvenigas tiun-ĉi eldonon pro ĉi tiuj kialoj: la eldono estas plaĉa; ĝi konigas al ni la nekonatan Orienton; ĝi havas sufiĉe grandan propagandan valoron.

M. M.

## KELI-Kongreso

En la nuna jaro la kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia okazos tuj post la U.K.

De la 10a de aŭgusto ĝis la 17a de aŭgusto KELI-anoj, simpatiantoj kaj interesiĝantoj venos al la fama *Kastelo „Münchenwiler"* proksime de la urbeto *Murten* en la belega okcidenta montparto de *Svislando.*

Krom la principaj, gravaj kaj diskutendaj temoj, kies gvidlinioj estas en la moto *„La kristano en la mondo"*, la organizantoj kompilis allogan programon.

Ekskursoj, distrajoj, renkontiĝoj k.t.p. apartenas al nia kongreso!

*Informoj kaj aliĝiloj ĉe:*

*S-ro F. LIECHTI*, Wallisellenstrasse 429, Zürich 50 — Svislando.

## Turismo

La tradician someran restadejon de Itala Esperanto Federacio, oni aranĝos ankaŭ ĉi-jare, en Ceresole Reale ĉe la Nacia Parko de Monto „GRANDA PARADIZO". La tri semajnaj vicoj, de la 4a ĝis la 25a de aŭgusto, ebligos la italajn kaj eksterlandajn gastojn ĝui agrablan restadon en tiu montara regiono famkonata pro ĝiaj naturaj belecoj. „GRANDA PARADIZO" situas 80 Km. nord-okcidente de Torino kaj estas ŝatata celo por alpinistoj kaj naturamantoj. La „PARADIZAJ FERIOJ" de 1956 akiris notindan sukceson kaj pri ili interesiĝis eĉ la itala gazetaro kaj radio.

Informojn kaj prospekton ĉe:

I.E.F. — TURISMOFICEJO — Casella Postale 248 — TORINO —

*(Sekvo de p. 19)*

kaj Fervojista sindikato, kiuj kune superas 1 milionon da dinaroj. La Fervojdirekcio aprobis apartan fervojan rabaton, kiu ebligos ĉeesti la kongreson ne nur al fervojistoj el la tuta mondo, sed ankaŭ al multaj gastoj el najbaraj landoj kaj Jugoslavio.

Tre alloga kaj riĉa programo, kaj ekskursoj en regionoj ĉemaraj kaj montaraj prezentos apartan ĝuon por la kongresanoj. Solena fermo de la kongreso okazos en fama groto de Postojna. LKK jam eldonis la oficialajn bultenojn kiuj entenas ĉiujn necesajn informojn kaj aliĝilon, kaj pere de Poŝtoficejo klopodos akiri honore al la kongreso specialan poŝtstampon.

Ne preterlasu la okazon pasigi agrable kaj nemultekoste unu semajnon en agrabla monato majo en ĉarma ĉemara regiono kaj konata elirpunkto por turismaj ekskursoj ĉiudirekten. Petu aliĝilon de 9-a Internacia Fervojista Esperanto-kongreso, Rijeka, Poŝtfako 95.


## LISTO DE LA MEMBROJ-KOMERCISTOJ

### Antverpeno

**G. Faes**, Schoenmarkt 16. Antverpeno. Muziko, Radio, Diskoj.
**„In 't Duifken" (S-ano Paesmans)**, Lge Koepoortstr. 64: Kostumoj (5 0/0 rab.)
**Vino Max Bolsius**, Diepestraat 58-60, Antverpeno: Kuirejilaro. Tel. 32.57.85
**M. Philips**, Karel Rogierstr. 1, Antverpeno. Korsetoj - Rab. 5-10% por la membroj.
**P. van der Hoydonck-van den Buys**, Kapelsesteenweg 549, St. Mariaburg. Ŝuoj — Teksaĵoj — Mercerajoj. Tel. 74.27.86
**J. Montmirail**, Kortemarktstraat 53, Berchem. Arĥitekto. Tel. 39.58.66
**Morris de Ketelaere**, Oostenstraat 25, Antverpeno. Hemiaĵoj. Tel. 39.17.09
**S-ino Henny Jacques-de Ketelaere**, Beeldekensstr. 31, Antverpeno. Gramofonaj diskoj por meminstruado. Tel. 33.75.38
**Roger Jaumotte**, Cyriel Buyssestr. 44, Antv. Anoncoj en tagĵurnaloj. Tel. 37.47.14
**K. Amerijckx**, Melgesdreef 40, Merksem. Centra Hejtado. Tel. 45.81.07
**R. De Soete-Vanistendael**, Dambruggestraat 234, Antv. Okulvitroj — Rab. 5 0/0
**CL. Peeters**, Onderwijsstraat 68, Antverpeno. Apotekejo. Tel. 35.40.67
**Firmo van Iseghem & Verstraeten**, St. Bernardse steenweg 631, Hoboken. Vitrajoj — Speguloj — Tel. 37.88.20
**J. van Nereaux**, Sterstraat 1, Antverpeno. Viandisto Tel. 39.55.81
**H. Peeters**, Vordensteistr. 58, Schoten. Inĝen.: Neon-lumo, Reklamoj. T. 81.48.47
**H. Jacques**. Lange Beeldekensstraat 31, Antverpeno. Presaĵoj. Tel. 33.75.38
**Verdijck**, St. Rochusstraat 174, Deurne. Ĉiaj asekuroj kaj hipotekoj. Tel. 39.06.07
**P. Peelman**, Volkstraat 34, Antverpeno. Fumaĵoj — Pantofloj. Tel. 37.62.55
**Y. Ameryckx**, Pr. Leopoldstraat, Borgerhout. Peltaĵoj
**A. van den Neste**, Deurnebaan 30, Merksem. Presad-inkoj. Tel. 45.78.59
**J. Van Hoof**, Marialei 7, Antw. - Pentraj-entreprenoj Tel. 39.35.33

### Bruĝo

**Marcel Poupeye**, Elf Julistr. 32. Ĉiaj asekuroj en la tuta lando. Tel. 371.93
**Charcuterie Strovi**, Vlamingstr. 48 (Teatroplaco) Viandvaroj. Tel. 334.08
**Maison Joye**, Gelmuntstr. 29. Ĉemizoj, Gantoj, Kravatoj. Tel. 332.75
**Firmo G. Verbeke**, spinolarei 19: Konstrumaterialoj. Specialaĵo: naturŝtono de Jura. Tel. 321.85
**Pan- kaj Kukbakisto R. ROSSEEL**, Mariastraat 30, Konsumsalono. Tel. 338.34

### Bruselo

**M. Jirousek**, 104 rue du Téléphone; reklamoj kaj litertipoj 18.77.67
**Farmaciisto Jacobs**, 94, rue général Eenens Bruxelles 3 15.26.01
**Farmaciisto N. Nelis**, Meise 59.13.73
**„BONBONS SWINNE"**, 77, rue de Nieuwenhove 44.57.36
**Imprimerie Lielens**, 18, rue de la Princesse 21.10.98
**CARRELAGES „Carrart"**, 19, avenue de Saxe 21.74.49
**Viajn MEBLOJN** ĉe **S-ro Weyn**, aĉetu rue Destouvelles, 57 15.96.97
**Libroj, Publikaĵoj, ĵurnaloj, F-ino Kestens** 24, rue Bodenbroeck 11.71.03
**Tinkturejo, senmakuligejo „TEX"** 11, Av. du Couronnement, Woluwe St. Lambert 70.75.82

**KOMERCISTOJ kiuj senkoste propagandas por Esperanto per reklamoj en siaj butikoj**

**G. Baeten**, Belpairestraat 53, Berchem. Tel. 39.22.81. Frizisto por sinjorinoj
**„De Boerinekens"** (Clem. Van Hassel). Estro de la trinkejo en la Flandra Operdomo
**A. Roels**, Montignystraat 155, Antverpeno. Ledaj artikloj-Selisto. Tel. 37.14.07
**G. Goemaere**, P. Genardstraat 39, Antverpeno. Speciejo, laktejo
**Vandersmissen**, Kampioenstr. 11, Antverpeno. Paperaĵoj, parfumaĵoj
**Librejo Schuttershof**, Schuttershofstr. 36, Antv.: luo, aĉeto, vendo de libroj
**Vojaĝ-agentejo Pier Busseti**, Hopland 5, Antv.: privataj kaj grupvojaĝoj


## KORESPOND-ANONCOJ

1. Jvü Javūrek — 12jara lernanto deziras korespondi kun nederlanda amik(in)o. Pri ĉiuj temoj kolektas p.m. Adreso: Dolni Bludovice, Okres Ĉeskij Tesin ĉ 27.
2. Jan Horáĉek, 12jara knabo kun amik(in)o nederlanda per bildkartoj. Adreso: Stará Ves Potoĉ 4, okr. rymarov.
   Ambaŭ Ĉeĥoslovakio.
3. Junuloj de Moskva mezgrada lernejo serĉas kontakton kun nederlanda esperantistoj. Bonvolu skribi al: S.V. Sariĉev, abonkesto no 1259, Moskvo k-9 U.S.S.R.

S-ro Jukimura Kiosuke 3-Ŝimmei-ĉo AKAŜI Japanujo 26jara kokobredisto.

S-ro Tani Hirokazu Mijahoŝita Hajaŝi AKAŜI Japan 15jara liceano, komencanto.

F-ino Kaŭaniŝi Sumiko Minamizaikoku-ĉo TAKASAGO Japan 28jara oficistino pri kokobredado, studoj, ĝardenkulturo, detektivnoveloj.